

MEDITADO

surbaze de la Evangelio laŭ Sankta Marko (12, 38-44) kaj de
Libro Unua – Reĝoj (17, 10-16)

Ni preĝu al la Sankta Spirito, ke Li descendu en niajn korprofundojn kaj plenigu nin per la Saĝeclumo kaj Gracofontanoj, por ke ni komprenu ĝuste la Dian Parolon kaj volu fervore plenumi Dian volon. La Plejsankta Virgulino Maria – nia Patrino kaj Reĝino gvidu nin al sia Filo Jesuo.

En la fragmento de la Evangelio laŭ Sankta Marko Jesuo diris al la disĉiploj, ke ili gardu sin kontraŭ la skribistoj, kiuj ŝatis iradi tra la placoj en longaj, belaj roboj kaj ŝatis ricevi belajn salutojn kaj okupi unuajn lokojn en la temploj kaj ĉe la tabloj dum la festenoj; ili formangis la domojn de vidvinoj kaj por preteksto ili longe preĝis. Poste Jesuo observis, kiel la homoj enĵetis monerojn en la monkeston. Multaj riĉuloj enĵetis multe da mono. Kaj unu malriĉa vidvino enĵetis du monerojn – tio signifas unu groŝon. Jesuo eksplikis al la disĉiploj,

ke tiu malriĉa vidvino enĵetis pli ol ĉiuj ĵetantoj en la monkeston, ĉar ĉiuj enĵetis el sia abundo kaj tiu malriĉa vidvino enĵetis el sia senhaveco ĉion el sia tuta vivrimedo.

Kaj nuntempe estas homoj similaj al la enevangeliaj skribistoj. Ilia religieco estas ŝajna. Ilia vivo kaj agoj ne konvenas al Dekalogo – al Diaj ordonoj. La skribistoj amis nek Dion, nek homon. Pro tio Jesuo diris al la disĉiploj kaj diras al la homoj de ĉiuj tempoj, ke gardu sin kontraŭ tiuj, kiuj estas similaj al la enevangeliaj skribistoj.

Por ke ni havu spiritan forton rezisti al la malbona agado, al iu ajn tento, ni iru al la Tablo Festena – al la Eŭkaristia Tablo, por esti fortopenaj per la Sanktaj Korpo kaj Sango.

“Vere, vere, mi diras al vi: Se vi ne manĝas la Korpon de la Filo de Homo kaj ne trinkas lian Sangon, vi ne havas en vi vi-

von. Kiu manĝas mian Korpon kaj trinkas mian Sangon, tiu havas eternan vivon; kaj mi relevigos tiun en la lasta tago” (Joh 6, 53-54). Tion diris Jesuo en la sinagogo, instruante en Kapernaumo.

En la fragmento de Libro Unua – Reĝoj estas prezentita Elija, kiu vivis laŭ la ordonoj de Dio kaj Dio prizorgis lin en diversaj malfacilaj cirkonstancoj. Laŭ la ordonoj de Dio korvoj alportadis al li la panon kaj viandon kaj el la torento li trinkadis. Unufoje por la preĝo kaj la petoj al Dio de Elija reviviĝis la filo

de unu vidvino. Feliĉigita la vidvino – la patrino de la knabo, kiu revenis al la vivo danke al la preĝoj de Elija – la virino diris al Elija: “Nun mi eksciis, ke vi estas homo de Dio kaj ke la vorto da la Eternulo en via buŝo estas vera.” (Reĝoj 17,24)

Pri kiu homo nuntempe ni povas diri, ke li estas homo de Dio? Por respondi al tiu demando, mi citas tiun ĉi versaĵon:

Nur lumeto ia, portas la esperon.
Sur la vivovojo – la amo kaj vero.
Por la aliaj – rideto, konsolo,
kvankam tristeco kaŝita en koro.
La preĝo sincera, sindona al Dio –
dankemo pro ĝojo, tristeco – pro ĉio.
La strebo neskuebla, rekta al la celo,
al kiu gvidant’ estas – la Gardanĝelo.

(“Bildo de l’ homo feliĉa” – Z. K.)

Prilaboris Zofia Kamieniecka